

& La Amo de la Fiŝkaptisto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 261 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis kaj komponis Gerhard Schöne (Die Liebe des Fischers). El germana tradukis Bertilo Wennergren kaj Birke Dockhorn. Baladigis Martin Strid (2016) per disdivido de strofoj kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29> (

/(mimi mimi mimi remi redo doTi do;)×2

(#Rekantaĵe: MiMi MiMi MiMi MiMi MiLa LaLa La; MiSi SiSi SiTi TiTi Tire rere re e)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Fiŝoj fuĝis sub la ŝtonojn. Suno kaŝis sin. ; Fiŝkaptisto juna venis re je l' tagofin'.

(×:; **Danco fluas, tondre bruas en la festa hal'** ; **Akvo fluas, ondoj bruas sur la vasta mar'**.)

'2 En mantelo nigra lin atendis ĉe l' haven' ; la juĝisto de l' ĉeftero. Li parolis jen:

'3 Oni kaptis junedzinon vian ĉe la far' , ; adultantan kun fremdulo fian sen kompar'

'4 Laŭ kutim' insula je matena kri' de kok' ; ni ŝin puŝos en la morton de la monta rok'

'5 Preĝis juna fiŝkaptist' en malfeliĉa hor' : ; "Koro, el la brusto mia nun ne saltu for!"

'6 Nokte grimpis li kuraĝe sur la rokomur' , ; super la abismo ligis reton de sekur'

'7 Ŝtopis ĉion li per pajlo kaj per branĉetar' , ; kaj la tuton kovris li per fojno sen avar'

'8 Kiam la unua lumo venis de la sun' , ; oni puŝis ŝin. Ŝi falis, sed al mola pun'

'9 Ĉar la reto de pardona amo kaptis ŝin. ; Fiŝoj ludis sub la ŝtonoj. Suno montris sin.)